

STARTO

N-ro 1/2011 (238)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Matěj Nárožný el Svitavy
kun diplomo *Kristnaska Poezio* el Tersto

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, p/a Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea@esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 300 Kč, B 200 Kč, C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: p/a Anna a Jiří Vyšínkovi, Kollárova 131, 696 42 Vracov, tel. 518 628 155, anjivy@seznam.cz

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, pri informadiko

Komisiono de ĈEA: pedagogia

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj: Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova@centrum.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

195 230 825 / 0300

Poštovní spořitelna Poděbrady

Komitato de ĈEA:

Prezidantino: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice, melicharkova8@seznam.cz (reprezentado de ĈEA, kunordigado, internaj asociaj rilatoj, metodiko)

Vicprezidanto: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobříchovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz (internaciaj rilatoj, fakaj aplikoj de Esperanto, ĈEA-retkomunikoj, eldona agado)

Vicprezidanto: Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, tel. 602 611 584, Tomecek@esperanto.cz (muzeo, konferencoj, TTT, ekster-asociaj rilatoj)

Sekretario: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnický@quick.cz (protokolado, korespondado, rilatoj kun la banko)

Kasistino (komitatano A de UEA): Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, libusehyblova@seznam.cz, 774 928 974 (membrobazo, kontado)

Komitatanino: Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424, pavladvorakova@tiscali.cz (kluboj, projektoj)

Komitatano kaj redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 530 319 263, malovec@volny.cz (sekcioj, komisionoj)

Ĉefdelegitino de UEA por Ĉeĥio kaj UK-perantino: Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. č. 1, 130 00 Praha 3, tel. 603 444 828, Lucie.Karesova@seznam.cz

Kontrolgrupo de ĈEA:

Prezidantino: Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 461 532 257, dvor.libuse@seznam.cz

Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, 517 332 339, vhirsx@email.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 00 Pardubice, Ludmila.Srbova@seznam.cz

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer domo, Máchova alej 1, 568 02 Svitavy, direktorino: Blanka Cuhelová, tel. 461 532 704, cuhelova@muzeum.svitavy.cz.

Kontrollegis: Sabine Hauge, Pavel Polnický, Vratislav Hirš.

50 jaroj de Esperanto en Česká Třebová

Inter la 17-a kaj 19-a de septembro 2010 okazis solenado de 50 jaroj de Esperanto en en Česká Třebová. Partoprenis centoj da esperantistoj el la tuta respubliko kaj kelkaj gastoj eksterlandaj.

Vendrede en la Kultura Centro estis prelega posttagmezo: *Historio de la internacia lingvo Esperanto* (M. Malovec), *Rolo de Esperanto en la moderna mondo* (P. Chrdle), *Esperanto kaj fervojistoj* (J. Nieman), *Esperanto-rondeto „Amikeco“ en Česká Třebová* (L. Kovář) kaj *Aplikado de Esperanto en faka terminologio* (H. Hoffmann). Sekvis vespermanĝo en la apuda kafejo Esperanto.



Memorŝtono en la parko Javorka

Sabate ĉiuj kolektiĝis en la parko Javorka, kie estis inaŭgurita Esperanta memorŝtono. De la parko la partoprenantoj malrapide promenis supren sur monteton, kie staras restoracio Na Horách (Sur la Montoj), fama kiel iama banloko, kie dum certa tempo restadis verkistino Božena Němcová (1851). Ĉi tie travivis sian infanaĝon esperantistino Jana Křížková, organizanto de la solenado. Ŝi rakontis la historion de la domo

kaj montris la belan ĉirkaŭaĵon kun impona kapeleto kaj kuraca akvofonto. En la restoracia salono okazis la oficiala programo de la renkonto.



En la restoracio de Hory

Pere de diapozitivaj estis prezentita la historio de la klubo, la agado por infanoj (Z. Novotná), por fervojistoj (L. Kovář), fondo de Esperanto-kolekto en la Urba Muzeo (J. Pištora) kaj aliaj meritaĵoj de la klubo. La menciitaj kaj ankoraŭ kelkaj aliaj ricevis klubajn diplomojn. La vesperon fermis dancamuzo kun tombolo.



Tosto antaŭ la restoracio de Hory

Dimanĉon matene la partoprenantoj povis elekti inter komputila seminario (gvidis M. Hruška) aŭ promeno tra la urbo (gvidis L. Kovář).

-mm-

Silvestro en Česká Třebová

okazis la 29-an de decembro 2010 en la Sport-klubo ekde la 19-a horo. Temo de la vespero estis Talent-manio en Esperanto. Vespermanĝo, tosto, danco, teatro.

Rigardu nian filmon:



*Sendisputa bonhumoro
Disdonado de donacetoj
Dresado*



*Novjara tosto
Danco
Teatro kaj Imitado*

Šumperk – urbo de la nunjara ĈEA-kongreso

Alvenu al ni kaj estu kore invitata! Kie? Ja en Šumperk. Escepte de maro la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo proponas ĉion, pri kio vizitanto povas sopiri. Ĉiu vizitanto trovas ĉi tie historiajn memorindaĵojn, romantikan pejzaĝon, profundajn arbarojn, tra kiuj zigzagas vojoj por piedpromenantoj kaj por bicikloturistoj. Tuj kiam falas la unua neĝo, la ĉirkaŭaĵo fariĝas magneto por entuziasmuloj de vintraj sportoj, altiras ilin ĉefe la nova ski-areo en Kouty nad Desnou kun sesloka seĝa telfero, per kiu eblas veturi ĝis sub la plej granda akva elektrocentralo en nia lando – Dlouhé stráně.




Urbo Šumperk, kun pli ol 30.000 loĝantoj, situas en la montaro Jeseníky, la urbon trafluas riveroj Desná kaj Morava. La regiono kaj la urbo komencis esti loĝataj en la 13-a jarcento, en la 17-a jarcento la regiono suferis pro sorĉistaj procesoj. En la 19-a jarcento disvolviĝis tolfabrikoj, tolproduktado, vitrofabrikado. Post la dua mondmilito la plejparto de la germana loĝantaro estis translokita. Plue disvastiĝis lignoindustrio, teksa industrio kaj maŝinindustrio.

En la urbo estas 7 preĝejoj de diversaj religioj, ni estas fieraj pro urba muzeo, regiona teatro, Geschaderdomo de ĉeĥa-germana amikeco, kulturdomo, belaj parkoj, renovigitaj loĝrestadejoj, novaj domoj, renovigitaj lernejoj. Tion ĉion gardas la plej alta monto de Moravio – Praděd kun alteco 1492 m. Alvenu persone konvinkiĝi, kiel ni fartas en Šumperk.



La kongreso okazos en la tagoj 7-a ĝis 9-a de oktobro 2011 en la meza faklernejo en la strato Zemědělská. Pliajn informojn vi povos ricevi ĉe la asocia retpaĝaro www.esperanto.cz kaj www.esperantosumperk.estranky.cz, kie vi trovos pli da detaloj pri la kongreso kaj ankaŭ pri Šumperk kaj ĝia ĉirkaŭaĵo.



*Teksto Hana Talášková
Esperantigis kaj fotis Karel Vala*

77-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj

Blindulsekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kun granda ĝojo informas, ke la 77-a Internacia Kongreso de Blindaj E-istoj okazos ekde la 14-a ĝis la 21-a de julio 2011 en Olomouc, Ĉeĥa Respubliko. La kongreson aŭspicias la estraro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

Kongresejo: hotelo SIGMA en Olomouc, Jeremenkova 36, CZ 772 11 Olomouc.

La kongreskotizo de 6500 ĉeĥaj kronoj por unu persono inkludas loĝadon en dulitaj ĉambroj kun duŝo kaj necesejo, televido, telefono, plue tri manĝojn tage, unu tuttagan kaj du duontagajn busajn ekskursojn kaj kongreslibron. Neinkludataj estas trinkaĵoj dum manĝoj, biletoj por publikaj trafikiloj kaj aliaj kromaj elspezoj.

Prepara komitato estas jena: Jan Příborský (prezidanto), Jiří Jelínek, Tadeusz Karas, Ivana Karasova, Jiří Vychodil.

La kongresa temo estas: „Plibonigado de aliro al kulturaj aranĝoj por blinduloj“. Dua temo, proponita de la prezidanto de LIBE estas: „Kiamaniere trovi taŭgajn rimedojn por allogigi studadon de Esperanto por plifortigi nian movadon“.

Provizora programo de la kongreso:

Ĵaŭdo (14.7.2011): Alveno de partoprenantoj, Interkona Vespero.

Vendredo: Solena malfermo de la



kongreso, akcepto ĉe estraranoj de la urbo Olomouc, trarigardo de la urbodomino, de modelo de la konstruaĵo kaj supreniro en la urbodoman turon, promeno tra la historia centro de Olomouc, rigardo al la fama kolono de la Sankta Triunuo, de historiaj fontanoj kaj de modelo de historia parto de la urbo; promenkonzerto en centro de la urbo aŭ koncerto en la preĝejo de sankta Miĥaelo kun trarigardo de la templo.

Sabato: Konversacia kurso de Esperanto; prelego „100 jaroj de ekzisto de la loka Esperanto-klubo“. Prelego laŭ la kongresa temo. Trarigardo de la katedralo de sankta Venceslao, patrono de ĉeĥoj, kaj de la palpa ekspozicio de ekleziaj objektoj, supreniro al la sonorilejo en la katedrala turo. Vizito de la ĉefdioceza muzeo aŭ de la ĉefepiskopa palaco. Aŭskulto de la proksima Kantanta Fontano kaj vizito de la kafejo en la 18-a etaĝo de la Regiona Centro.

Dimanĉo: Konversacia kurso de Esperanto. Prelego(j) laŭ la kongresa temo. Vizito de la proksima klostra fortikaĵo kun ebleco de supreniro en la turon. Promeno tra la strato de Zamenhof, vizito de la Esperantomonumento kaj Esperanto-arbo en la plej granda urba parko. Aŭskulto de koncerto en la parko kaj kafumo en proksima restoracio.


Lundo: Konversacia kurso de Esperanto. Ĝenerala asembleo de LIBE (unua parto). Vizito de vendejo de blindulhelpiloj kun ebleco aĉeti ilin. Mallonga vizito de la historia armea fortikaĵo. Vizito de ekologia domo en proksima urbeto.

Mardo: Tuttaga ekskurso al Brno – la plej granda urbo en Moravio. Vizito de la Teknika Muzeo, ekspozicio de blindula kulturo. Prelego pri K. Em. Macan kaj pri la 90-a datreveno de organizo de la unua kongreso de blindaj esperantistoj en Prago en la jaro 1921. Ekspozicio de muzikmaŝinoj kaj gurdoj. Vizito de gravaj historiaj konstruaĵoj en Brno aŭ en ĝia ĉirkaŭaĵo.

Merkredo: Konversacia kurso de Esperanto. Ĝenerala asembleo de LIBE (dua parto). Vizito de la baziliko sur Sankta Monteto, vizito de la zooparko kun palpado de diversaj objektoj, libera promeno tra la zooparko. Arta vespero. Fermo de la kongreso.

Ĵaŭdo 21.7.2011: Forveturo de la partoprenantoj.

Jan Přiborský



Marcipana Kristnasko

Dimanĉe la 5-an de decembro 2010 okazis en la Esperanto-muzeo la tria Marcipana Kristnasko. Ĝi povas esti dank' al geedzoj Anna kaj Jiří Vyšinka el Vracov. Pri nia aranĝo kaj pri Kristnasko en Svitavy antaŭinformis Ĉeĥa Radio kaj regiona ĵurnalo. Eĉ malagrabra vetero ne deturnis la geedzojn de la vojo al Svitavy. Samideaninoj el la Svitava klubo preparis por infanoj memorfoliojn.

Ĉar lastjare Anna post Marcipana Kristnasko ne povis paroli, ĉi-jare ŝi gvidis la formadon per mikrofono. Pro la grandega intereso pri formado de marcipanaĵoj ni preparis ankaŭ pli multe da tabloj por infanoj. Ankaŭ ĉi-jare alveturis infanoj el aliaj urboj. Dank' al la mikrofono la infanoj bone aŭdis la gvidantaron kaj gepatroj povis babili, aĉeti aŭ gustumi marcipanon kaj kokosajn produktojn aŭ sidi en najbara teĉambro kaj trinki specialajn teojn. Infanoj formis de la 9-a horo ĝis la 17-a horo. Cento da infanoj produktis pli multe ol 330 bestetoj. La ĉi-jaraj produktoj de sinjorino Vyšinková estis donacitaj al infanoj de Speciala Baza Lernejo en Svitavy kaj al infanoj de infanĝardeno en Moravská Chrastová. Multe da gastoj dankis por la aranĝo en nia vizitlibro de E-muzeo. Inter la vizitantoj estis nova urbestro Mgr. Šimek kun sia familio. Alvenis ankaŭ urba televido por fari mallongan televidan filmeton.

Libuše Dvořáková

LA 15-AN DE DECEMBRO EN LA ĈEĤA RADIO

Laŭ instigo de Jarmila Rýznarová, la ĉiutaga komuna nokta programo de ĉiuj regionaj stacioj de la Ĉeĥa Radio (Český rozhlas) - la radioforumo „Nokta Linio“ („Noční linka“) - dum du horoj ĉirkaŭ la noktomezo de la 15-a al la 16-a de decembro 2010 havis kiel temon „Esperanto kaj lernado de fremdaj lingvoj ĝenerale“.

Dum 74 minutoj (plus muzikpaŭzoj) la moderato akceptadis kontribuojn de aŭskultantoj el tuta Ĉeĥio, kiuj rekte telefonis en la studion aŭ skribis retpoŝte. Li aparte invitis al kontribuo personojn kiuj scipovas Esperanton. Enkonduke ankoraŭ, inter aliaj datrevenoj de la tago, menciigis la naskiĝtago de L. L. Zamenhof kiel motivo de la temo.

Entute aŭdiĝis alvokoj de 14 personoj, 12-foje laŭtleĝigis retmesaĝo. En la kontribuoj 14-foje oni parolis pri Esperanto, 18-foje pri siaj spertoj kun fremdaj lingvoj ĝenerale. Estas pozitive, ke neniam aperis negativa opinio pri Esperanto. Kelkfoje kontribuis esperantistoj, sed ankaŭ neesperantistoj plurfoje menciis sian renkontiĝon kun Esperanto aŭ almenaŭ montris simpatian por ĝi.

Registraĵon de la elsendo eblas portempe elŝuti en la formato MP3 de: http://is.muni.cz/de/172464/20101215-16_cro-regiony_nocni-linka_1.mp3

http://is.muni.cz/de/172464/20101215-16_cro-regiony_nocni-linka_2.mp3

Atentu: Entute estas 68 MB (en du partoj: la unua kaj la dua horoj).

ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS

(oficiala organo de ĈEJ redaktata de Marek Blahuš)

Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ) finas la jaron 2010 per ampleksa raportado pri agado sia kaj de siaj membroj.

Al la gazeto Starto (4/2010) kontribuis Marek Blahuš (pri ĈEJ, La Espero) kaj Daniel Mrázek (Žirovnice), sur la kovrilpaĝo aperas Mirek Hruška (ĈEA-konferenco en Poděbrady). Revuo Esperanto (1/2011) aperigis 2,5 paĝojn da tekstoj de Marek Blahuš (interreto, KAEST, E@I, GIL), kies tekston pri KAEST aperigis ankaŭ La Ondo de Esperanto (1/2011). Tie aperas ankaŭ raportaĵo de Mirek Hruška pri Žirovnice, kies malkonciza versio jam troveblas en la retpaĝaro de ĈEJ. Por Kontakto (3/2010) Mirek Hruška verkis artikolon pri Brno.

Okaze de la Zamenhof-tago, la Praga klubo de ĈEJ kunvenis naŭope la 14-an de decembro. En Brno kvar junuloj kunvenis jam la 24-an de novembro, poste aliaj neformale kadre de pola kaj ukraina vesperoj.

En Francio Marek Blahuš maltrafis la dupaĝan Esperanto-anoncon de Etsuo Miyoshi pro striko de gazetliveristoj kaj la Zamenhof-feston en Metz pro neĝa vetero. Perrete li tamen kontribuis al la programo Noční linka de la Ĉeĥa radio, same el Brno faris Michal Matúšov.

Al la novjara junulara renkontiĝo JES en Burg (Germanio) aliĝis 5 ĉeĥoj. Retpaĝaro de ĈEJ troviĝas ĉe

<http://cej.esperanto.cz/>

La 6-a Sabla Printempo

alportas du ŝanĝojn:

- ĝi ne okazos rekte en la urbo Písek (kies nomo en la ĉeĥa lingvo signifas „Sablo“, pro orohava sablo minata en la mezepoko el la rivero Otava, ĉe kiu la urbo situas), sed tamen jes en la distrikto Písek (tial oni lasas la originan nomon de la aranĝo)

- la faka programo ĉi-foje ne koncentriĝos pri Interreto kiel kutime, sed pri traduko de turismaj tekstoj, event. por seriozaj interesuloj ankaŭ prilaboro de mallongaj filmoj kun vojaĝtemo (dublado aŭ subtekstigado en Esperanto)

Tial la aranĝo ĉi-foje estas taŭga NUR por ĉeĥparolantoj!

PROGRAMO DE SABL PRINTEMPO:

* tradukseminario kaj kunveno de Labora tradukgrupo de ĈEA

* trarigardo de la **monaĥejo de Milevsko** (surfote), Nacia Kultura Memorindaĵo

* vizito de inaŭguro de la migra ekspozicio „Ĉu Esperanto estas morta lingvo?“ en la urba biblioteko

* projekciado, babil- kaj muzikvespero kun gitaro

Okazloko: SPORHOTEL Milevsko

Detalajn informojn kaj aliĝilon vi povas elŝuti

<http://www.esperanto.cz/eo/akce/sabla-printempo-381.html>

Kapacito de la aranĝo estas ĉi-jare limigita, tial kaze de intereso ne forgesu ĝustatempe aliĝi!

Info: pisek (ĉe) esperanto.cz

Skoltoj en Kopřivnice

trovis perditan memorŝtonon

En Kopřivnice vivis aktivulo de esperantismo kaj skoltismo Rudolf Zanáška (1907-1954), kiu prizorgis en loka parko memorŝtonon **Ripozejo de D-ro Esperanto**, inaŭguritan la 24-an de septembro 1950. Ĝi staris en la mezo de kvinpinta stelo, inaŭgure parolis Rudolf Hromada.



Nun neniu scias, kiamaniere la ŝtono estis likvidita, sed la nuntempaj skoltoj de Kopřivnice, kiuj vidas en la agado de Rudolf Zanáška sian historion, trovis la ŝtonon post la urbo en arbaro kaj nun hezitas, kion fari pri ĝi.

Pri trovo de la ŝtono aperis eĉ filmeto en loka kabla televido kaj artikolo en loka gazeto, nia asocia retejo ĝin metis inter siajn aktualaĵojn. Iru al la adreso www.esperanto.cz kaj dekstre supre enskribu **skauti** kaj klaku al *Hledat* (Serĉi). Aperos artikolo pri skoltoj en Kopřivnice kaj tie vi povas klaki al la bildo de televida parolistino – tuj ŝi komencos paroli, poste sekvos filmeto pri la skoltoj trovintaj la ŝtonon sub argilo kaj petantaj helpon restarigi ĝin. Ĉu iu el vi ne scias, kio estis surskribita?

-mm-

Rynárec oficiala retejo en Esperanto

La vilaĝo Rynárec havas nun oficialan retejon en Esperanto danke al Max Kašparů. Iru al:

www.rynarec.cz/index.php/uredni-deska/227-esperanto

Horloĝo kaj Esperanto

estis la titolo de la dimanĉa *Festa Vorto* en Ĉeĥa Televido la 20-an de februaro



2011, en kiu kuracisto Max Kašparů dum 5 minutoj lerte prezentis ankaŭ la internacian lingvon. Li diris, ke al siaj pacientoj, kiuj havas problemojn komuniki kun aliaj

personoj („babilonanoj“), li montras portreton de Zamenhof kiel simbolon de homa interkompreniĝo, kaj al tiuj, kiuj subiĝas al senbridaj tentoj („trompitoj“), specialan horloĝon, kiu funkcias inverse kvazaŭ en spegulo – ĉar la pacientoj same kiel la horloĝo havas ĉion, kion ili bezonas, sed en ilia menso ĉio funkcias kvazaŭ renversite. La filmeto estas spektebla en la retejo de Ĉeĥa Televido (sub *Sváteční slovo* = Festa Vorto).

Merkrede la 23-an de februaro 2011 Max Kašparů aperis en televido ankoraŭ unufoje, nome en programo Koloroj de la Vivo (Barvy života), sed tie li parolis pri Pasko, Cindra Merkredo kaj aliaj kristanaj kutimoj. Ankaŭ tiu programo estas trovebla en la retejo de Ĉeĥa Televido, sed M. Kašparů estas nur unu el la programeroj. Serĉu laŭ alfabeto ĉe www.ceskatelevize.cz/porady/a-z/.

Kantaro-vikio nun havas pli ol 2000 kantotekstojn!

Ekde la jaro 2003 "kantaro-vikio" – alinome la "libera kantaro" – estas loko por ĉiu muzikema esperantisto, kie eblas trovi multegon da kantotekstoj, notoj, videoj kaj aliaj muzikaĵoj. Funkcianta kiel vikio, ĝi ebligas komunan laboron de esperantistoj el diversaj mondopartoj.

En la komenco la kantaro-vikio havis nur kantotekstojn, sed la vivo ne staris unuloke kaj nun krom tekstojn oni povas trovi ankaŭ muziknotojn, akordojn, tonsilabajn melodiojn, midi-dosierojn kaj ankaŭ spekti videojn.

En kantaro-vikio trovis sian duan vivon ankaŭ paperaj kantaroj. En speciala paĝo vi povas trovi liston de paperkantaroj kaj la kantotekstojn en ili.

Kiu uzas kantaro-vikion? Ho! Komencantoj, gvidantoj de kursoj, amatoraj ludantoj, mem aŭtoroj kaj muzikistoj kaj finfine ĉiuj muzikemuloj!

Grandan dankon! – Kaj nun venu, vidu, kunkantu! – Adreso de la libera kantaro: <http://kantaro.ikso.net/>

laŭ [cirkulero n-ro 4 de kantaro-vikio]

Sukcesa reprezentado

Matěj Nárožný, kiu lernas Esperanton ĉe Marie Minářová ekde 2008, akiris la unuan premion en sia aĝo-kategorio en E-konkurso de la itala Tersto por la temo *Kristnaska Poezio*, kiun partoprenis 512 infanoj el 12 landoj (Belgio, Bosnio-Hercegovino, Brazilo, Bulgario, Ĉeĥio, Francio, Italio, Kroatio, Litovio, Rumanio, Ruando kaj Vjetnamio).



La infanaj artaĵoj estis eksponitaj en grandmagazeno „Il Giulia“ de Tersto (6.-20.12.2010), kies vizitantoj kundecidis pri la venkintoj. La tridimensia verko de Matěj bone reprezentis nian landon kaj la urbon Svitavy kun ĝia E-muzeo. Jam en 2009 li akiris la 3-an premion per desegno okaze de la 100-jariĝo de IFEF (tiun konkurson proklamis ĈEA kun la muzeo en Svitavy).
-mm-

Invitilo

*por regiona renkonto de esperantistoj
kaj de iliaj simpatiantoj*

***Svitavy, sabate la 26a-n de marto
2011 je la 10-a horo antaŭ la
fervoja stacidomo***

Programo:

10:30 h – trarigardo de la dana entrepreno Fibertex

12:00 – 13:00 h - tagmanĝo

13:30 h – Esperanto-muzeo:

- rakontado pri vojaĝoj tra Albanio inkluzive de fotoj kaj mallonga video (Ilonka Bauerová)

- raportoj de rondetoj, invitoj al sekvaj aranĝoj

- tombolo

- vizito de la Urba Muzeo kaj Galerio por jenaj ekspozicioj:

„Vizite ĉe la avino“

„Supervido 2011“ – verkoj de la regionaj plastikaj artistoj

Kore invitas membrinoj de Klubo de amikoj de Esperanto en Svitavy

Svitavy en Ĉina Radio

Lunde la 21-an de februaro 2011 Ĉina Radio en sia programo Inter ni elsendis telefonan intervjuon kun Petro Chrdle pri la muzeo en Svitavy. La tutan interparolon vi povas aŭskulti ĉe la adreso

<http://esperanto.cri.cn/641/2011/02/21/1s121316.htm>

Ĉu firmo aŭ firmao?

D-ro Josef Kavka estas elstara natursciencisto, profesia petrologo, sed ankaŭ lingvosciencia kaj esperantologia eksperto orientita al nomenklaturaj kaj ties etimologio kaj semantiko.

En 1996 aperis lia verko *Kontribue al PIV* (eld. KAVA PECH), en kiu li esplore kaj kritike sekvis esperantajn radikfinojn kaj ilian koincidon kun sufiks(oid)oj.

En 2009 la sama temo, iom relaborita kaj plivastigita, estas publicita kiel speciala kajero de *Scienca Revuo (ISAE)*, vol. 60, kajero 1, ISSN 0048-9557). Ĝuste tiun mi al vi parte prezentos.

En mia *Konstru-Forumo* 25, p. 163, punkto 47, mi reagis pri ies rimarkigo, ke ni preferu la esprimon *firmaoŝildo* antaŭ *firmoŝildo* (temas pri reviziata Esperanta Bildvortaro *Duden*, temo 271). Mi defendis la originalan zamenhofan formon *firmo* kaj malaprobis la novan formon *firmao* per vortoj krudaj, nome ke „ĝi estas produkto de iu lingvistika nekompetentulo (fakte stultaĵo kun du gramatikaj finaĵoj, kun la internacia *a* kaj la esperanta *o*)“. Nun mi demonstras, ke mia decida starpunkto ne estas senkoncepta. Josef Kavka en siaj verkoj avertas nomenklaturajn vortaristojn antaŭ misformado de **internacie kodifitaj nomoj** pro homonimia fobio. Tuj en la prefaco de sia nova verko li prezentas la ekzemplon de neserioza perturbo de faka esperanta leksiko:

La konifernomo *Taxus* ne misformiĝu en Esperanto al „taksuso“ (PIV, NPIV) por eviti homonimecon kun la fundamenta radiko taks/, sed nepre fariĝu taksos, kohera kun la famili-nomo taksacoj (*Taxaceae*), kun la veneno taksolo ktp.

La problemo de latinaj kaj internaciaj radikfinoj ne koncernas nur la supre

menciitan *a*, sed same intense ankaŭ la finaĵojn *e*, *i*, *o*, *u*. Ilia konservado en esperantaj radikoj estas plago por nia lingvo, fenomeno, kiu kompromitas Esperanton en scienculaj rondoj, malaltigas ties fidindecon.

El la verko de Kavka mi nun prezentos kelkajn ekzemplojn almenaŭ el la jam komencita *a*-problemo:

„damao“ el la cervedoj, nomenklature *Dama*, latine *damma*, devus fariĝi **damo**, sendanĝere homonima kun nobla sinjorino.

„kamerao“ (*camera*) liveras tute superfluan, nepre evitindan paronimon al la fundamenta **kamero**.

„majao“ = **majo**; la indianan genton en Centra Ameriko ja neniu konsiderus kiel monaton.

La supervidon pri la latina *a*-finaĵo Josef Kavka fermas per la vortoj: Resume oni povas konkludi, ke la senpripense homonim-fobia enkondukado de *A*-vortoj draste perturbas la nomenklaturajn sistemojn.

Sekvas pluaj ekzemploj kaj admonoj pri la latinaj kaj internaciaj finaĵaj *-e*, *-i*, *-o*, *-u* truditaj al la esperantaj vortradikoj. Apartaj ĉapitroj estas dediĉitaj al la radikfinaj silaboj AD, AN, ON, AR, ER, AT, IT, OT, ED, (ET), EG, EN, IN, IK, IL, IS, ID, IV, KS, OL, UL, OR, (ATOR, ADOR), PUS, UM, US.

Centoj da interesegeaj demonstroj pri laika konsistigado de esperanta scienca leksiko. Legindaj kaj studindaj estas ĉiuj 72 paĝoj de la kajero. Domaĝe, ke ISAE post 100 jaroj de sia ekzisto estas organizaĵo dormanta, kun membraro ŝrumpinta al sensignifa eta rondo. La publiko leginta la verkon do estas tre limigita.

Sed la baro por la kompetenta kritiko troviĝas, surprize, eĉ en Rotterdamo. Antaŭtempe ĝenerala sekretario de UEA petis de D-ro Kavka manuskripton pri *Scienca leksiko de Esperanto* kun la intenco publikigi ĝin eldone de UEA. D-ro Kavka plenumis la peton, sed poste ekfunkciis nova ĝenerala sekretario, kiu la verkon „dronigis“. Laŭ la informo de Kavka, ĉiuj liaj intervenoj vanis. Oni ne respondis liajn leterojn, eĉ ne reagis al lia peto revenigi la manuskripton. (Surpriza konduto de la gvida movada organizaĵo, ĉu?)

Pro la alta aĝo kaj malsano d-ro Kavka tamen trovis sanan forton por sprite fermi sian verkon: „...ni konfesu, ke ne ĉiam ni kapablis diveni realan motivadon de NPIV. Ekz. ĉu ne ŝajnas esti plene absurda la procedo de ĝiaj kompilintoj okaze de *Cyperus papyrus*: cipero, sed ne „ciperuso“, „papiruso“, sed ne papiro. Se oni nepre timus homonimecon kun cip-ero, kial oni ne elektis la konsekvencon „ciperuso“ „Papiruson“ ni jes komprenas, ĉar oni timis homonimecon kun pap-iro...“

La verko estas finita per la bibliografia listo kun 85 literaturaj titoloj.

Kun sincera danko kaj disĉipla admiro mi notas, ke plurajn formulojn mi uzis laŭ la recenzata verko *Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature kaj terminologie (kontribue al La Nova PIV)* (ISAE 2009) kun la permeso de ties aŭtoro D-ro Josef Kavka, kompleze leginta la manuskripton.

Jan Werner

Rimarkigo de la redakcio: *Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature* (1-10) aperadis unue en Starto en la jaroj 1994-1996, poste aldonoj ankoraŭ en 1997 (11-12) kaj 2002 (13-14).

De Zamenhof al Soros

estis titolo de simpozio, organizata en la Novjorka Oficejo de UEA okaze de Zamenhof-tago la 15-an decembro 2010.

Tidavar Soros (1894-1968) estis esperantlingva verkisto de libroj *Maskerado ĉirkaŭ la morto* kaj *Modernaj Robinzonoj*, kiujn angligis Humphrey Tonkin. La simpozion vizitis ankaŭ filo de la verkisto, fama financisto George Soros, kiu ne estas favoranto de Esperanto, sed ege estimas sian patron. Al la simpozio kontribuis pluraj gravuloj kiel profesorino Esther Schor, filmisto Sam Green aŭ historiisto Ralph Dumain.

Darwin en Esperanto

Unu el la ĉefverkoj de la monda scienco kaj filozofio estas *La origino de specioj* de Karolo Darvino (1809-1882), kredanta kristano. La verko aperis en 1859, do en la sama jaro, kiam naskiĝis L. L. Zamenhof, sed ties lingvo longe evitis la darvinismajn verkojn.

Nur en 2009, kiam la mondo festis 200 jarojn de la naskiĝo de la granda sciencisto, kanadano vivanta en Tokio, Klivo Lendon (*1961), entreprenis la tradukon de la menciita verko kaj eĉ ricevis premion de Fondaĵo Grabowski. La tradukon eldonis Flandra Esperanto-Ligo (22,80 eŭroj ĉe libroservo de UEA), sed ĝi estas legebla ankaŭ en la interreto www012.upp.so-net.ne.jp/klivo/origino/.

Sciencaj verkoj aperas en Esperanto nur malofte, tamen ili estas tre gravaj por pruvi la taŭgecon de la internacia lingvo same por la fakaj aplikoj kiel por la beletra tradukado kaj verkado.

-mm-

GRAVA VIVJUBILEO DE JOSEF XAVER KOBZA



En la 27-a de februaro 2011 estas grava vivjubileo de multjara sindona kaj aktiva esperantisto – pastro Josef Xaver Kobza. Li naskiĝis en la vilaĝeto Herbortice, kie li travivis gravan parton de sia vivo. Li estas kunfondinto de la Katolikaj E-Tendaroj en la 1970-aj jaroj ĝuste en sia vilaĝeto.

Frato Xaver (laŭ tiu nomo li estas plej konata inter la esperantistoj) post forlaso de la baza lernejo fariĝis razisto. Ne longe post tio maturiĝis en li sopiro pri sacerdotiĝo. Tiucele li en la jaro 1941 ekstudis en Písek en Instituto por Malfruaj Sacerdotaj Vokitecoj ĉe Kongregacio de Fratoj de la Plejsankta Sakramento (Petranoj). Sekvan jaron lia studado estis interrompita ĝis fino de la milito pro deviga laboro en Germanio.

Post fino de la II-a mondmilito (1945) frato Xaver studis ĉe Petranoj en České Budějovice kaj sekvan jaron li fariĝis novico en Kongregacio de Fratoj de la Plejsankta Sakramento. Li studis teologion ĝis 1950, kiam okazis fifama tutŝtata invado kontraŭ klostroj, likvidanta la ordenojn kaj kongregaciojn fare de komunista kontraŭeklezia bato. Post kelkmonata restado en la interniga koncentrejo por pastroj en la klostro de Hejnice, li estis fordirektita al PTP (armea reeduka laborbataliono). Fine de 1952 li estis kun 15 aliaj „soldatoj” arestita kaj juĝita de armea tribunalo pro „ŝtatperfido, spionado kaj sabotado”. Fine li estis kondamnita je dujara karcer-restado pro nepermesita grupiĝado.

Post akiro de libereco, frato Xaver 15 jarojn laboris en sia razista profesio, dume li sekrete plu studis teologion kaj fine en 1969 li estis sekrete ordinita. En 1971, post 30-jara interrompata studado, li povis finfine publike ĉe la altaro mescelebri. Nuntempe, en sia 90-a jaro li loĝas en porpastra pensiulejo en České Budějovice.

Spite de ĉiuj malfacilaj vivsituacioj, nia kara amiko Xaver ĉiam konservis bonan humoron. Kie li estis, tie regis ĉiam gaja atmosfero kun ofta kantado. Certe ni estas scivolemaj, kion li diris pri sia engaĝiĝo en la E-movado post sia esperantistiĝo instigite de sia frato Stefano.

„Esperanto tre riĉigis mian vivon. Post mia reveno el malliberejo hejmen en Herbortice kaj laborante denove mian profesion, mi fondis E-rondeton, por lerni internacian lingvon. Baldaŭ poste ni partoprenadis diversajn E-aranĝojn enlande, ankaŭ en Pollando. La feliĉa okazo tuŝis min, kiam mi povis partopreni Universalajn Kongresojn en Sofio kaj Budapeŝto. Tre belajn rememorojn pri ili mi havas. La katolikaj someraj Esperantaj tendaroj en mia naskiĝvilaĝo Herbortice estis por mi ankaŭ granda ĝojo, kompreneble ankaŭ la ceteraj esperantistaj renkontiĝoj kaj precipe la IKUE-Kongresoj en Olomouc, Romo kaj Rimini. Ankaŭ en Písek, kie mi plenumis animzorgan servon, ni havis kelkajn sukcesajn E-aranĝojn. Mi kredas, ke tiel genia inventaĵo, Esperanto, plenumos en estonto sian historian rolon. Estas necese, ke ekzistu konstante novaj kaj novaj esperantistoj, parolantaj Esperanton.“

Nia kara jubileulo, ni dankas pro via modelo, kiel plenumadi la gravajn vividealojn. Dio plu benu vin!

Miloslav Šváček

90-jariĝo de Josef Kobza

La ĉi-jaran aranĝon „Vojo al Budějice“ E-klubo „La Ponto“ Písek okazigis la 26-an de februaro 2011 omaĝe al naskiĝtago de la honora membro de ĈEA pastro Josef Kobza (nomata ankaŭ Patro Xaver), ĝisvivinta en enviinda fizika kaj psika freŝeco sian 90-an datrevenon.



La solenaĵon okazintan en la agrabla medio de la Pastra hejmo partoprenis dudeko da plejparte sudbohemiaj esperantistoj; inter la gratulantoj estis ankaŭ IKUE-prezidanto Miloslav Šváček kaj d-ro Max Kašparů, alportinta por la jubileanto belegan torton en formo de Esperanto-flago.

La kulturalan programon prizorgis preci-

pe Miroslav Smyčka kun sia pianisto Ladislav Tříška. Kelkaj registraĵoj (ekzemple ĥoralo Sankta Venceslao, Ave verum corpus de Mozart aŭ Ho suno mio – O sole mio) estos disponeblaj ankaŭ en Aktualajtoj de

www.esperanto.cz.



La pinte ĝojiga programero estis kanto, kiun prezentis Patro Xaver mem, akompanante sin per gitaro. La aranĝo estis eta esprimo de nia danko al tiu ĉi ĉi rara modesta homo kun nekontestebla karismo, kiu plene dediĉis sian vivon al senlaca amplena servo al la aliaj. Ĉu ni renkontiĝos ĉe li post dek jaroj okaze de ankoraŭ pli glora jubileo?

-padv-

Belega estis ankaŭ la solenaĵo sabate antaŭtagmeze en preĝejo, kie kun pastro Xaver celebris meson episkopo Jiří Paďour kaj pluraj aliaj pastroj.

-mŝ-

Jiří Karen (1920-2000)

Serĉado de blua tono

Retrovita ciklo pri Fryderyk Chopin (1810-1849). Esperantigis Jiří Kořínek.

LA INSTRUISTO DE CHOPIN VOJTĚCH ŽIVNÝ

La patro de Chopin ridetas

„Muziko? Pĥa!

Sur la pargetoj de l' vivo

ĉu mia filo ŝanceliĝu?

Superflua ...

Eĉ se la tonoj el lia piano sonus

kiel pluvogutoj

de muziko

ne eblas vivi“

Al maestro Živný ne estas ridhumore

Li estas fridnebula kaj maltenera

Li kaŝe kaj longe scias

ke la lernant' superas majstron

Jam longe li devis al si diri

kiu kredas kaj kiu estas nekredanta

kiu al kiu kaj por kio dankŝuldas

La paseo kaj futuro

disiras

kiel per punkto apartiĝas frazoj

sed ke la muziko estus io kiel pĥa?

„Sinjoro patro... kiam estingiĝas en la

salonego

Ĉu estas mallumeto kaj okuloj ardas kaj

la sango

ŝaŭmas?

Muziko? Estas uragano

Enire en paradizon

de forgeso

Kaj se nur tio ...“

Jiří Karen

Revuloj



Originale verkita poemaro pri amantoj, esperantistoj kaj fervojistoj ricevis anonime la 2-an premion en Belartaj Konkursoj 1980. Ni rememoru la duoblan jubileon (naskiĝo kaj forpaso) de la aŭtoro per la du retrovitaj verkoj (Serĉado de blua tono kaj Revuloj).

VAGONAROJ

En energie ritma tono

triumfe vagonoj gongas,

torturante relojn.

Bruante sin pelas

la ekspresa trajno.

Ĝemante, peze ĝi ektrenas.

Al montaroj venante,

zigzage ĉevalas,

sibladante monologas

en la valoj

la loka trajno.

En vante ripoza pozo,

jam nenion atendante,

senknare, senvoĉe staras

olda, flankenŝovita trajno

sur ruzaj reloj.

Multon pri la homa vivo

tia trajno diras.

AMOREVOJ EN NEGLIĜO

Apenaŭ desur ŝia kapo

falis rozmareno,

de sceno malaperis

mistere vualita feino.

Ho lala, edzino dikiĝis.

Eĉ sonĝe babilaĉas pri mono,

vestoj kaj manĝo.

La iam diafana feino.

Jaroslav Krolupper

Esperanta versado

Por tiuj, kiuj konas J. Krolupper sole kiel tradukanton de poezio, lia originala verkado eble estos surprizo. La eldonejo KAVA-PECH eldonis 54-paĝan broŝuron kun 53 poemoj. Jen gustumu:

Urso

Venis, jen, al blanka urso
partianoj por diskurso
Voris ĝi du demokratojn

Nun okazas jara kurso
preparanta al konkurso
pluajn taŭgajn kandidatojn

Maljunaĝo

Onidire maljunaĝo
provizejo de vivsaĝo
Mondprogreson tio kaŭzas

Sed ne venos dimesaĝo
de papago en birdkaĝo
kiu al si plumojn taŭzas

Ni citu el letero de unu el la provlegantoj Carlo Minnaja:

„ ... kaj ke la celo (amo, pejzaĝo, naiveco, momentaj impresoj) estas plene atingita. Sendube lerta, tre lerta estas la kapablo versi: nenia eksterPIVa vorto, nenia tro denssignifa esprimo, rimoj kaj ritmoj ĉiam glataj. Kelkfoje ili ŝajnas virtuozaĵoj ekzercoj por trovi nekutimajn rimojn (stumbli-grumbli), sed vere mi legis kun plezuro. Mi ne miras, ke pluraj el ili gajnis en literaturaj konkursoj. En la ĝenerala panoramo de la nuntempa E-poezio, kie regas Camacho, Carr, Krys Ungar, Nervi ĉi tiu nova (por mi) poeto trovas tute dignan lokon.“

Vizito en la Praga Esperantista Klubo



La 3-an de februaro 2011 okazis en EK Praha kunveno de esperantistoj kun inĝ Richard Hašek, nepo de la fama verkisto Jaroslav Hašek kaj posedanto de pensio „U České koruny“ en Lipnice nad Sázavou, kie estis verkita soldato Ŝvejk.



Ŝvejk kaj Ne nur soldato Ŝvejk en Esperanto

Li ĝoje akceptis nian inviton pro nia intenco donaci al li la libron pri ŜVEJK. Kiel videblas, li ricevis ne sole tiun ĉi. Kaj ni „ricevis“ en lia persono sinceran amikon, kaj esperas, ke niaj kontaktoj daŭros...

*Margit Turková, 3.2.2011
Fotis Petr Chrdle*

Karla Erbová

KRAJINA S PODPISY PEJZAĜO KUN SIGNATUROJ

La tradukinto Jaroslav Krolupper prezentas en la nova poezia libro poetinon Karla Erbová, aŭtorinon de dudeko da poemaroj, kiu mem akompanas siajn versojn per kolaĝoj (bildoj gluitaj el pluraj elementoj). La spegula eldono prezentas maldekstre ĉeĥajn originalojn, dekstre esperantigon. Eldonis Petr Dvořák, Dobříš 2010.

KIAM ADAMO KUN EVA

forkuris el paradizo
anĝelo ekkolerinta ĵetis al li pladon
Tiun kiun knedis la unua homa mano

Li - estaĵo ĉarma
estis tiam plena de furiozo

Li - kiu ĝis tiam gustumis nenion
jam akre juĝis

Li - kiu ne scietis
kiel feliĉa estas la kreito
antaŭ momento knedita de Sinjoro

Li - kiu ne sciis
ke la homo-likoperdo
kaj dornejo merloplena
ne volas vivi kapitulacante
kaj ŝancelas ĉiam
tion kio ŝajnis certa
en la ora barilo

La Sinjoro nur rigardis

Li jam sciis kio malbonas

Rim: *likoperdo* - pejchavka, *merlo* - kos

Čestmír Vidman

LASKAVÁ FANTAZIE KARESA FANTAZIO

Ankaŭ tiu ĉi libro estas dulingva, sed la tradukintoj estas tri: Jaroslav Krolupper, Jiří Patera kaj Margit Turková. Fotojn faris Emil Vejvoda kaj Jan Komárek, ilustris Olga Stárková, eldonis Petr Dvořák, Dobříš 2010.

TUTMONDA TAGO DE KORO

Koro estas dinamo
koro estas turbino
la agado sen fino
Ĝi viglas konstante
nian enton gardante
Akurata ĉiu horo
tempo estas diktatoro
Jen matene ree alvenas aŭroro
En la mondo batas koro
en preskaŭ sep miliardoj da homaj
estuloj
Sed vekiĝas ankaŭ en la mondanguloj
da aliaj koroj miliardoj
de pursanguloj de bastardoj
Koro la manon etendas
La koro vivon defendas

La 23-an de septembro 2006



Poděkování dárcům

Členové muzejní skupiny děkují paní Lydii Panské z Jihlavy za věnovanou sbírku obálek a pohlednic s příležitostnými razítky z esperantských akcí, zvláště pak z kongresů. Doktoru Augustinovi Svobodovi z Brna za nálepku 1. kongresu českých esperantistů v roce 1909. Také znojemští esperantisté poslali své materiály.

Obálky a pohlednice ze světa jsou to, co nám nejvíce neesperantisté a zvláště potom filatelisté závidějí. Proto tímto prosíme i ty, kteří tyto materiály mají a mohou je muzeu věnovat, aby tak učinili.

V rámci jednotlivých výstav bývají i skříňky s jinou, ale jednotnou tematikou. Nasbírané materiály při těchto příležitostech budeme postupně vystavovat. Při minulé výstavě byla prezentována korespondence Josefa Flídra z Litomyšle. Jeho výstavka přilákala zájemce i ze zahraničí."

Dary zasílejte na: Muzeum esperanta Svitavy, náměstí Míru 1, 568 02 Svitavy.

Libuše Dvořáková

Rekomenditaj retejoj

Retejo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

www.esperanto.cz

Katalogo de Esperanta retenhavo – Ampleksa ligilaro de kvalitaj E-retejoj

http://eo.wikibooks.org/wiki/Katalogo_de_Esperanta_retenhavo

Konciza klariga vortaro (laŭ modelo de PIV)

<http://www.krokodilo.de/vortaro/index.php>

Laŭtema bildvortaro

<http://cs.lernu.net/lernado/vortoj/bildvortaro/index.php>

Manlibro pri tradukado

http://eo.wikibooks.org/wiki/Manlibro_pri_tradukado

Valora kolekto de studoj pri esperantologio

<http://lingvakritiko.com/>

Kantaro-Vikio (interreta kolekto de pli ol 2000 E-kantoj, daŭre kompletigata)

<http://kantaro.ikso.net/kantaro-vikio>

Alt kvalita virtuala filatela ekspozicio „Historio kaj nuntempo de Esperanto“

<http://www.japhila.cz/hof/0395/index0395a.htm>

Kukolo – speciala retserĉilo kun x-tajpo, fleksio de esperantaj vortoj, fokusitaj serĉoj

<http://tekstoj.nl/kukolo/kukolo.htm>

La Ponto – portalo ebliganta subtekstigi esperante mallongajn filmojn

<http://laponto.esperanto.org.ar/>

Lingvoludoj

<http://eo.lernu.net/lernado/ludoj/index.php>

Nova turisma retpaĝaro en Esperanto - Hotelo Na Trojce, Nové Žibřidovice, Jeseníky (viaj salutaj retmesaĝoj estas bonvenaj!)

<http://www.hotelnatrojce.cz/spe/index.htm>

Lančov 2011

1-a etapo 3.7. - 16.7.2011

2-a etapo 17.7. - 30.7.2011

3-a etapo 31.7. - 12.8.2011

Infanoj ĝis 15 jaroj 2990 Kč, pli aĝaj 3190 Kč (3480/3680 Kč por aliaj lingvoj ol Esperanto).

Vidu www.set-lancov.cz, informojn petu ĉe info@set-lancov.cz. Vi povas ankaŭ skribi al **Esperanto, 674 01 Třebíč** aŭ telefoni al **736 249 264**.

Fine de la tria etapo okazos jam tradicia renkontiĝo de iamaj tendaranoj.

Monda Pupekspozicio Esperante

Inter la 13-a kaj 17-a de oktobro 2010 la organizantoj de la unika *Monda Puppekspozicio Esperante* teste eksponis en Izucuja – Tradicia Domo – en la urbo Higashikagawa (insulo Ŝikoku kun 4-miliona loĝantaro) oriente de Oosaka. Ĝi provcelis la ĉi-jaran publikan prezentadon en oktobro, 1-a ĝis 16-a.



La pli ol 1500 ĉeestantoj povis plenigi enketilon, el kio evidentiĝis, ke ili sentis vivan korplezuron, profunde emociiĝis kaj surpriziĝis; al aliaj plaĉis la litova panelo kun pejzaĝo, rakontoj pri pupistoj kaj historio inter Litovio kaj Japanio; kelkedeko volis frandi tradiciajn manĝaĵojn. Multaj konsentis, ke vigligi la urbon per Esperanto estas ege bona ideo.



Ĉi-aŭtune okazos la *Monda Puppekspozicio Esperante*. Tiam estos eksponataj ĉ. 300 pupoj el 21 landoj (10 eŭropaj, 6 afrikaj kaj 5 sudamerikaj) kune kun paneloj pri historio, rilatoj inter Japanio kaj la landoj de la pupoj, pupistoj, mapoj, poŝtkartoj, libroj, ekzotikaj bongustaĵoj kaj ilia landa muziko. La plano estas ene de 5 jaroj montri entute 1500 pupojn el 100 landoj.



La kolekto riĉiĝis per la kontribuo de Esperantistoj el 21 landoj, ekzemple: Petr Chrdle (Ĉeĥa Respubliko), Vlad'ka Chvátalová (Belgio), Aida Čížikaitė (Litovio), Horst Grunner (Kamerunio) kaj Georgo Handzlik (Pollando). Kameruniaj pupoj flugis al Kuba UK kaj Atilio Orellana Rojas portis ilin ĉi tien; Vlad'ka venigis 36 pupojn de Benino, Ganao kaj Togolando tra Belgio. Niaj kunlaborantoj plejparte aperigis informojn en siaj lokaj amaskomunikiloj, nerekte reklamante tiel pri Esperanto kaj interesigante novulojn. Ambaŭflanke inda profito.

Bildoj:

1. La ekspoziciejo sen homoj
2. La ekspoziciejo kun homoj
3. kaj kun du vizitantoj detale.



Petr Chrdle el Dobřichovice kontribuis al ĉi tiu projekto per sendado de tipaj ĉeĥaj manfaritaj pupoj kun priskribo de iliaj roloj en ĉeĥaj fabeloj.



Informis: Etsuo Miyoshi, Prezidanto de Nova Turisma Asocio



Liberec 7. – 14. 5. 2011

INVITILO

al la 63-a Kongreso de la Internacia Fervojoista Esperanto-Federacio en Liberec, Ĉeĥio, inter la 7-a kaj 14-a de majo 2011

Estimataj gesamideanoj,
la ĉeĥaj fervojistaj esperantistoj tutkore invitas vin partopreni la 63-an kongreson de IFEF, kiu okazos de la 7-a ĝis 14-a de majo 2011 en la urbo Liberec. Post dekjara paŭzo nia ĉeĥa landa asocio de IFEF akceptis por la 3-a fojo (1991 – urbo Olomouc, 2001 – urbo Tábor) organizi la kongreson kaj ni tiucele elektis la nordboheman urbon Liberec.

Ni esperas, ke denove ni sukcesos kaj ke vi estos kontentaj pro nia gastamo. Ni ĝojatendas, ke vi amase vizitos la kongreson kaj travivos neforgeseblajn tagojn en nia lando.

Bonan venon al Liberec!

Kore invitas vin organizantoj de LKK:
Prezidanto: Inĝ. Ladislav Kovář; *Vicprezidanto:* Jindřich Tomíšek; *Sekretario:* PhDr. Anna Abelovská; *Kasisto:* Anna Abelovská; *Fak-aranĝoj:* Inĝ. Jaroslav Matuška; *Kulturaj aferoj:* Alois Klumpar; *Turismaj aferoj:* Andrea Hasala; *Loĝado:* PhDr. Anna Abelovská; *Kongreslibro:* Vít Stanovský; Kaj helpantoj por aliaj servoj: informado, libro-servo, ĉiĉeronado k.t.p

Kongresejo: Kongresové centrum Babylon, Nitranská 1, 460 12 Liberec, www.centrumbabylon.cz

LKK: Český železničářský esperantský svaz, Bratří Hubálků 161, 560 02 Česká Třebová, tel. +420 465 532 183, IFEF63@gmail.com, www.ifef.wz.cz

100 jaroj de Esperanto en Olomouc

Inter la 10-a kaj 12-a de junio 2011 esperantistoj en Olomouc festos 100-jariĝon de sia klubo. Loka periodaĵo *Radniční listy* (Urbodoma gazeto) en sia februara numero 2011 publikigis artikolon de la kluba prezidanto Jan Duda *Esperanto zní v Olomouci už celé jedno století* (*Esperanto sonas en Olomouc jam unu tutan jarcenton*). La gazeton ricevas senpage ĉiuj loĝantoj al siaj hejmaj leterkestoj, do la tuta urbo ekscias pri Esperanto kaj pri la kluba solenaĵo. Plie la klubo aranĝis ekspozicion en Scienca Biblioteko. La gazeto estas elŝutebla ĉe

[http://www.olomouc.eu/radnici-listy/radnici-listy-2011_\(cesky\)](http://www.olomouc.eu/radnici-listy/radnici-listy-2011_(cesky))

Informojn pri la solenaĵo vi ricevos ĉe Jan Duda, dudajanol@centrum.cz.

<http://www.esperanto.cz/eo/akce/centjari-o-de-ek-olomouc-386.html>

Aktualaĵoj ce Esperanto.cz

Spirita muziko:

<http://www.esperanto.cz/cs/aktuality/nove-nahravky-duchovni-hudby.html>

<http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/novaj-registra-oj-de-la-spirita-muziko.html>

Arkiva filmo pri la Ĉeĥoslovaka kongreso 1950 en Brno:

<http://www.esperanto.cz/cs/aktuality/archivni-film-z-r-1950-nyni-na-webu.html>

110 jaroj de Esperanto en Brno

La esperantistoj en Brno festos la jubileon de la *Unua societo de aŭstraj esperantistoj* la 21-an de majo 2011 en Občanský klub Brno-střed, Hybešova 45, inter la 10-a kaj 17-a horo per koncerto kaj prelegoj. La detalojn alportas la kluba retejo <http://www.medy.cz/brno-esperanto/index.htm> kaj same la asocia www.esperanto.cz. Eblas mendi tranokton 700 Kč por nokto en dulita ĉambro.


Esperanto kaj spiritaj tradicioj de la mondo

Tio estos la titolo de nova ekspozicio, kiu estos solene inaŭgurita okaze de Muzea Nokto la 4-an de junio 2011 en Esperanto-muzeo en Svitavy.

Religioj ĉiam havis gravan signifon en nia movado, kiel pruvas niaj fakaj asocioj de katolikoj, ortodoksuloj, protestantoj, kvakeroj, ekumenistoj, bahaanoj, budhanoj, islamanoj, ŭonbulanoj, Oomoto. Parencaj temoj estas filozofio, Martinus-kosmologio, ateismo, teozofio kaj similaj fluoj, kiuj ne estas rekte religiaj.

Ankaŭ la esperantlingva literaturo pri la

spiritaj tradicioj de la homaro estas sufiĉe riĉa kaj la verkoj povas konsistigi interesan ekspozicion. Biblio, Korano, Bhagavadgito estas la plej famaj el ili. Cetere, ĉu vi scias, ke la lastan verkon esperantigis Fran-



cisko Valdomiro Lorenz?

Migra ekspozicio „Ĉu Esperanto estas morta lingvo?“




La ekspozicio, kiu komenciĝis lastjare en marto en Urba Biblioteko Písek, estis 1.2.-3.3. prezentita en Sudbohemia Sciencia Biblioteko en České Budějovice kaj akompanita de la publika diskuto pri Esperanto, okazinta samloke 17.2. kun aŭtorino de la projekto Pavla Dvořáková. La tuto inkluzivas variigeble 16-23 A1-formatajn panelojn kaj 3 librovitrienojn.



1.-28.4. la ekspozicio okazos en Urba Biblioteko Milevsko kaj ekde 29.4. ĝis fino de majo ĝi estos videbla en Urba Biblioteko Pelhřimov. Dum la monato aŭgusto vi povos viziti ĝin en Elbregiona Muzeo en Poděbrady. Pluaj kontraktoj

estas ankoraŭ fintraktataj. Pri aktualaĵoj vi estos informitaj en la sekva numero de Starto.



La fotogalerion vi povas vidi en http://esperanto1.rajce.idnes.cz/Putovni_vystava_Je_esperanto_mrtvy_jazyk/

-padv-



Hospodaření ČES v roce 2010

| Příjmy | rok 2010 | plán 2011 |
|------------------------------|----------------|----------------|
| předplatné Starto | 1 309 | 1 000 |
| písemné kurzy | 3 100 | 3 000 |
| prodané zboží libroservo | 24 356 | 10 000 |
| brožura Objevte esperanto | 0 | 12 000 |
| úroky z účtu | 506 | 500 |
| příspěvky UEA na běžný rok | 14 730 | 10 000 |
| příspěvky UEA na budoucí rok | 21 360 | 20 000 |
| kongr. popl. na běžný rok | 10 195 | 0 |
| kongr. popl. na budoucí rok | 30 420 | 35 000 |
| konference (sjezd) ČES | 81 260 | 80 000 |
| příspěvky IFEF | 1 200 | 0 |
| příspěvky ILEI | 1 500 | 1 800 |
| příspěvky ČES na běžný rok | 28 040 | 26 000 |
| příspěvky ČES na budoucí rok | 33 410 | 30 000 |
| kurzový zisk | 548 | 0 |
| ostatní nedaňové příjmy | 0 | 21 219 |
| dotace | 31 500 | 25 000 |
| příspěvky (dary) | 35 360 | 35 000 |
| akce klubů, kroužků, sekcí | 22 300 | 15 000 |
| Wikimánie | 0 | 80 000 |
| konference nevidomých | 0 | 200 000 |
| Příjmy celkem | 341 094 | 605 519 |

| Peněžní prostředky | |
|---------------------------|----------------|
| pokladna korunová | 10 468 |
| postkonto | 232 676 |
| účet v EUR u UEA | 0 |
| peníze celkem | 243 144 |

| Investice | |
|-------------------------|----------------|
| podílové listy | 173 133 |
| Investice celkem | 173 133 |

| pohledávky | |
|--------------------------|------------|
| faktura | 300 |
| pohledávky celkem | 300 |

| závazky | |
|-------------------------------|----------------|
| platby pro UEA | 63 728 |
| Pospíšil J. | 450 |
| Český železničářský esp. svaz | 81 357 |
| EK Olomouc | 260 |
| EK Svitavy | 3 384 |
| závazky celkem | 149 179 |

| Výdaje | | |
|-----------------------------------|----------------|----------------|
| poštovné a tisk Starto | 42 747 | 45 000 |
| muzeum (propagace) | 3 388 | 30 000 |
| konference (sjezd) ČES | 75 898 | 70 000 |
| poštovné a balné libroservo | 771 | 500 |
| telefon, pošt., cest., kanc.potř. | 10 310 | 10 000 |
| náklady UEA kolekt. čl. + EEU | 1 359 | 4 500 |
| poplatky bance | 1 683 | 2 000 |
| jízdné a stravné výbor ČES | 7 317 | 8 000 |
| příspěvky UEA | 19 725 | 35 498 |
| kongr. poplatek | 2 187 | 62 787 |
| kurzová ztráta | 0 | 1 000 |
| příspěvky IFEF | 0 | 50 000 |
| akce klubů, kroužků, sekcí | 62 803 | 15 000 |
| ostatní nedaňové výdaje | 33 887 | 13 000 |
| příspěvky ILEI | 1 159 | 1 500 |
| nákup zboží pro libroservo | 0 | 25 443 |
| brožura Objevte esperanto | 0 | 25 000 |
| Wikimánie | 0 | 90 000 |
| konference nevidomých | 0 | 200 000 |
| Výdaje celkem | 263 233 | 689 228 |

| Účelově vázané prostředky | |
|----------------------------------|----------------|
| fond Tilio | 24 961 |
| fond ediční | 12 660 |
| kluby bez práv.s., sekce | 63 097 |
| Celkem | 100 718 |

Výše uvedený stav je k 31.12.2010. Termínovaný vklad u UEA byl v roce 2010 po změně úrokové sazby zrušen a částka 150,- Eur byla převedena na běžný účet ČES u UEA. Případné dotazy Vám zodpoví Libuše Hýblová, email LibušeHyblova@seznam.cz, adresa Bohutín 136, 789 62 Olšany.



Pri arboj

Vespere mi dum raportado de eventoj en televido neprecize aŭskultis ion pri propono faligi arbojn, starantaj ĉe vojoj, ĉar ili kaŭzas multajn akcidentojn de aŭtomobiloj, kiuj kolizias pro ekfrapo al arboj. Tia aranĝo ĉesigus domaĝojn de posedaĵoj kaj vivoj. Sed ni vespermanĝis kaj pluraj eventoj estis same maltrankviligaj, kaj laŭ mia sukcesa maniero laŭ rekomendo sur afiŝo en mia laborejo en malsanulejo kontraŭ anima forbrulo: „*Problemo, kiam aperus, mi solvas ĝin tuj, se mi ne povas solvi ĝin, ne temas pri problemo, sed pri sensencaĵo*“, mi lokigis la informon ien flanken en mian cerbon.

Post kelkaj horoj mi enlitiĝis kaj ekdormis.

De tempo al tempo mi songas. Tiu ĉi songo estis nekredible klara kaj mi memoris ĝin post la vekiĝo. Mi estis fruktarbo en aleo. La arboj kunvenis kaj diskutis pri faligo. Mi laŭte parolis. Komune ni prilaboradis kontraŭproponon: forigon de aŭtomobiloj, ĉar ili moviĝas kaj povas eviti nin kaj ni tiun eblon ne havas, krome ni prizorgas ekvilibron en la naturo, kontraŭ aŭtomobiloj, kiuj la naturon damaĝas. Pli klare ol Suno estis, kaj nur stultulo dirus malon, ke mankas demokratio.

Mi vekiĝis je la kvara horo kaj la songon priskribis. Nu, legu! Io estas grava pri arboj....

Jindra Drahotová akiris unuan premion en la literatura konkurso Litera Turo 2010 per ĉi tiu rakonto.

Litera Turo 2011

Jen la nomoj de la gajnintoj:

Originala prozo: *1-a premio:* Jindřiška Drahotová (Pri arboj), Ĉeĥio; *2-a premio:* Erika Lohée (La enamiĝa anaso), Francio

Originala poezio: *1-a premio:* Elisabeth Le Dru (Pordoj), Francio; *2-a premio:* Gabriel Quéré (La Sorto), Francio

Traduko: *1-a premio:* Jean-Pierre Ducloyer, Francio; *2-a premio:* Nicole Else, Aŭstralio

Filatelistoj kaj esperantaĵkolektantoj kunvenos en Prago

Esperanto-Ligo Filatelista / Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj (ELF/AREK) estis fondita jam en 1968 kaj ekde la jaro 2008 ĝi estas laŭkontrakte kunlaboranta kun UEA, per kio ĝi estas iusence ankaŭ partnero de ĈEA.

ELF/AREK aranĝos de la 2-a ĝis la 6-a de septembro 2011 renkontiĝon en Prago kiun organize garantias la Kongresa kaj kleriga agentejo kaj eldonejo KAVA-PECH. En la programo estas du malfruposttagmezaj kunsidoj, ke restu tempo ne nur por vizito de la tiutempe en Prago okazanta 14-a internacia foiro de poŝtmarkoj, sed ankaŭ por turismado tra pragaj vidindaĵoj. La aranĝo estas malfermita ankaŭ por ĉiuj interesatoj.

Fine de la aranĝo estas planata komuna unutaga ekskurso al Svitavy, kie oni memkomprene vizitos la Esperantomuzeon, sed konatiĝos ankaŭ kun aliaj allogaĵoj de la urbo. Pli da informoj kaj aliĝilojn oni trovos sur la retpaĝo www.kava-pech.cz/arek -pch-

Aerveturanto Kráčmera

Ĉeĥa Televido regule elsendas klerigan programon por geknaboj, kies ĉefa heroo estas Aerveturanto Kráčmera (*Vzduchoplavec Kráčmera*), kiu en balono veturas super ĉeĥaj urboj kaj vizitas ties vidindaĵojn, ĉiam en akompano de lokaj geknaboj. La 18-an de januaro 2011 la televido elsendis viziton de Svitavy, kies infanoj invitis la aerveturanton ankaŭ en la muzeon de Esperanto. La unuminuta prezento estis filmita en majo 2010. En la retejo www.esperanto.cz vi trovos ligan al podkasta versio de la programo.

Kanto por AEH

Dimanĉe Ĉeĥa Radio elsendas kantojn laŭ deziro de la aŭskultantoj, kiuj volas gratuli al siaj amikoj aŭ parencoj per bela kanto. La 13-an de februaro 2011 oni povis aŭdi, ke Pavel Nechvíle petas kanton por 150 membroj en la Asocio de Handikapitaj Esperantistoj.

Keĉupo kiel gastronomia Esperanto

En *Lidové noviny* (Popola ĵurnalo) la 26-an de januaro 2011 redaktoro Tomáš Baldýnský publikigis artikolon *Pri keĉupoj de la mondo*. Li forte malkonsentas kun la usona eseisto Malcolm Gladwell, ke keĉupo estas „gastronomia Esperanto“, ĉar laŭ Baldýnský Esperanto ne havas glatan viskozecon de keĉupo, sed similas al rubaĵo balaita antaŭ la pordoj en koridoro de nacioj. Keĉupo estas pli „International English“, simpligita angla, balbutata en ĉiuj vilaĝoj de la mondo. Nu - ĉu kvereli, kiu lingvo estas pli keĉupeca?

Ĉu komune al EU?

En la februara numero de informilo *Liberecký kraj* (Regiono Liberec) aperis artikolo de Karel Podrazil, reprezentanto de Interlingua en Ĉeĥio, *Subteno de artefaritaj lingvoj*. La aŭtoro proponas, ke enkadre de multlingvismo en EU estu subtenataj kvar artefaritaj lingvoj, nome Interlingua, Interlingue, Ido kaj Esperanto, kaj laŭdire li akiris por tiu celo la vichetmanon de la regiono Liberec.

Komentoj pri la „slava Esperanto“

Aŭtune aperis informo, ke EU subtenas „slavan Esperanton“, fakte novan interslavan lingvon. Nun en la retejo <http://zpravy.e15.cz> aperis diskutado de la publiko pri tiu lingvo kaj artefaritaj lingvoj ĝenerale.

Ĉeĥan Vikipedion fondis esperantistoj

La ĉeĥa reta gazeto Wikimedium (www.wikimedia.cz/web/Wikimedium) en sia januara numero 2011 publikigis intervjuon kun M. Malovec pri tio, kiel li en 2003 helpis al Chuck Smith fondi la ĉeĥan Vikipedion per traduko de necesaj tekstoj el Esperanto. Tiamaniere la legantoj de la gazeto eksciis pri Esperanto. La Esperanta traduko de la intervjuo aperis ĉe



Libera Folio

www.liberafolio.org/2011/ceha-wikipedio-estis-fondita-pere-de-esperanto.

Nova propagandilo



Fama propagandilo **Malkovru Esperanton - Fascina lingvo** estas nun preparata en ĉeĥa traduko plenumita de Milada Kolářová kaj Vladimír Kolář el Mladá Boleslav.

La broŝuro estas komuna verko de la internacia teamo E@I, registrita oficiale en Slovakio, kaj ILEI (*Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj*). Ĝi estis verkita en Esperanto kaj tradukita jam al pluraj naciaj lingvoj.

Ĝi konsistas el jenaj partoj: 1. Bazaj informoj pri Esperanto, 2. Lingva prezento de Esperanto, 3. Personaj rakontoj pri Esperanto, 4. Zamenhof, iniciatinto de Esperanto, 5. Esperanto el psikologia vidpunkto, 6. Kutimaj demandoj pri Esperanto, 7. Lokaj informoj pri Esperanto.

Finfine ni havos belan propagandilon, kies manko estis longe sentata.

-mm-

La origina versio estas trovebla ĉe

http://ikso.net/broshuro/pdf/malkovru_esperanton_eo.pdf

Milada Kolářová

(1964 - 2011)

Bedaŭrinde, antaŭ ol ni povis transdoni la novan Starton al la presejo, venis trista informo, ke Milada Kolářová forpasis la 26-an de februaro 2011 post longa malsanado en la aĝo de 46 jaroj. Ŝi naskiĝis la 26-an de decembro 1964.

Ŝi do eĉ ne vidis sian tradukon de *Malkovru Esperanton* en presita formo. Malgraŭ sia malsano ŝi dediĉis al la tradukado grandan atenton kaj laboremon dum unu jaro.



Milada Kolářová kun salutoj de esperantistoj

Ŝiajn lastajn momentojn balzamis amikaj bildkartoj kaj salutoj, kiujn ŝi ricevis de esperantistoj.

Foto Vladimír Kolář

Finiĝis la Esperanto-elsendoj de Pola Radio

La pli ol 50-jara historio de la Esperanto-redakcio de Pola Radio estas finita. La lasta elsendo estis publikigita en la reto la 31-an de januaro 2011, kaj pliaj elsendoj ne okazos. La estraro de Pola Radio decidis, ke la sola dungito de la Esperanto-redakcio, Gabriela Kosziarska, ekde nun havu aliajn taskojn. Ekde majo pasintjare la Esperanto-elsendoj estis produktataj grandparte per volontulaj fortoj, trifoje semajne.

Forpasis Manashi Dasgupta

La renoma verkistino, edukistino kaj kantistino, patrino de Probal Dasgupta, forpasis la 15-an de decembro 2010.

Kongreso de la franca lingvo

Inter la 8-a kaj 10-a de septembro 2011 okazos en Prago tutmonda kongreso de instruistoj de la franca lingvo. Oni atendas ĉirkaŭ mil personojn.

Antaŭ 90 jaroj en Prago

En la jaro 1921 okazis en Prago la 13-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu estis samtempe la 7-a kongreso de UEA (tiam ili ankoraŭ ne estis la samo!), estis fondita SAT, super kiu akceptis patronecon prof. Albert Einstein. En la kongreso estis ludata komedio de Jaroslav Vrchlický *Nokto en Karlův Týn* en traduko de Miloš Lukáš, plie *La glavo de Damokles* de Gustav zu Pulitz en la antaŭkongreso kaj *La paĝo de l' reĝino* de Jenő Heltai kaj Emil Makai en la postkongreso.

La Virina Tago

La 8-an de marto 2011 kunvenos en Hiroŝimo 20 organizoj kun la temo „Paco kaj Virinaj Vivoj“. La Virina Tago originas en 1907 okaze de manifestacio de virinoj en Novjorko, por postuli panon kaj egalrajton. Esperantistoj el la tuta mondo ĉiujare sendas virintagajn salutojn al hiroŝimaj samideaninoj:

OSIOKA Taeko, Oogonzantyo 7-15, Minami-ku, Hirosima, 734-0041 Japanio
osioka@mua.biglobe.ne.jp

Kurac-herboj kaj ĥemio

Ĉeĥa-Esperanta kaj Esperanta-Ĉeĥa Vortareto de Medicinaj Vegetaloj kaj Sistema ĥemia nomenklaturaro en Esperanto estas disponeblaj ĉe la adresoj:

www.vortaro-med-veg-cs-eo.mypage.cz
www.sistema-nomenklaturaro-eo.mypage.cz

Zdeněk Pluhař

Kontribuu por Teleskopo

La retejo www.teleskopo.com estas scienca reta gazeto por publikigi esperantlingve fakajn artikolojn pri historio, filozofio, epistemologio (teorio pri sciado kaj kognado) kaj aliaj sciencaj branĉoj. Nun tie troviĝas 11 artikoloj elŝuteblaj en la formato PDF.

Nova aŭtomata tradukilo el la franca al Esperanto

Aperis aŭtomata tradukilo el la franca al Esperanto, libere uzebla ĉe la adreso <http://apertium.saluton.dk>

Kluba vivo

Brno: La klubo sin preparas por 110-jariĝo la 21-an de majo 2011 en la Civitana Klubo Brno-střed, Hybešova 45 inter la 10-a kaj 17-a horo. Post koncerta enkonduko sekvos prelegoj pri la historio de la klubo, rememoro pri gravaj atingoj kaj pri la klubaj gravuloj.

České Budějovice, Netolice, Písek: Festis la jubileon de la grava honora membro pastro Josef Xaver Kobza

Česká Třebová: Dum la soleno de la 50-jariĝo de la klubo ricevis diplomojn: Karel Čada, Svatopluk Čech, Vladimír Hampl, ing. Ladislav Kovář, Jana Křížková, Emilie Macháčová, Mgr. Zdenka Novotná, Miloslav Pelcl, Jiří Pištora, Anna Pištorová, Stanislav Štarman.

Moravské Budějovice: La 30-an de aprilo 2011 en la Muzeo de Metioj estos inaŭgurita ekspozicio pri poeto Otakar Březina kaj fremdlingvaj tradukoj inkluzive de Esperanto.

Olomouc: La 31-an de januaro 2011 estis inaŭgurita ekspozicio en la 1-a etaĝo de Scienca Biblioteko en Olomouc okaze de 100-jariĝo de la klubo en Olomouc.

Svitavy: Ĵaŭde la 24-an de februaro 2011 Ĉina Radio elsendis programon pri Esperanto-muzeo, la 26-an de marto okazis regiona renkonto de esperantistoj

Třebíč: preparas denove tri etapojn de sia tendaro en Lančov, estis aktualigita la retejo www.set-lancov.cz kaj prezento de la tutŝtataj retejoj Ĉeĥaj Tendaroj www.cesketabory.cz/ kaj Infanaj Tendaroj www.detske-tabory.info/

Žirovnice: La 20-an de februaro 2011 elsendis Ĉeĥa Televido 1 programon kun Max Kašparů „Esperanto kaj horloĝo“.

Karel Kraft 85

Honora membro de ĈEA Karel Kraft festis la 24-an de februaro 2011 sian 85-an datrevenon. Li aktivis en nia pedagogia sekcio, sed nun li estas konata precipe kiel aŭtoro de la Ĉeĥa-Esperanta kaj Esperanta-ĉeĥa vortaroj kaj libro pri savinto de infanoj Přemysl Pitter *Heroo de amo*. Interparolon kun Karel Kraft ni publikigis en Starto 4/2007.

Ofta eraro de ĉeĥoj

La ĉeĥa lingvo ĉesis uzi la aktivan preteritan participon (*podepsavši*) kaj en kelkaj situacioj anstataŭigis ĝin per la pasiva (*podepsaný*), kvankam nelogike. Sed necesas atenti, ke ni ne enkonduku la nelogikaĵon en Esperanton.

Anstataŭ „*my níže podepsavši*“ ni diras „*my níže podepsaní*“. Sed en Esperanto necesas diri „ni sube subskribintaj“, ne „subskribitaj“. Subskribita estas la dokumento, ne la homo, kiu subskribis.

Simile panjo demandas knabeton: „*Jsi už vyčuráný?*“ Necesas traduki: Ĉu vi estas jam pisinta? Ne eblas „pisita“, ĉar pisita estas la urino, ne la knabeto.

Ankaŭ „*najezený*“ (manĝinta) havas pasivan formon, kvankam senco estas aktiva.

Gramatike oni povas klarigi la pasivan formon en la ĉeĥa lingvo. La menciitaj verboj havas refleksivon (*podepsat se, vyčurat se, najíst se*), kvazaŭ ili estus transitivaj verboj kun refleksiva objekto. Tial eblas pasivaj formoj, kvankam la rezulta senco estas aktiva.

-mm-

KALENDARO

Kalendaro 2011

2011-04-1/3 La 6-a Sabla Printempo, ĉi-foje en Milevsko. Info: pisek@esperanto.cz

2011-04-11/16 Lingva seminario en Skokovy. Aranĝo de AEH, sed ne nur por handikapitoj.

Info: nechvilep@seznam.cz

2011-04-15/29 Flugkaravano al Ĉinio lige al la Internacia Esperanto-Konferenco en Wuhan pri la temo „La ĉina saĝo“. Info: www.kava-pech.cz/wuhan, chrdle@kava-pech.cz.

2011-05-07/14 La 63-a IFEF-kongreso, Liberec, Kongresa centro Babylon.

Info: ladislav.kovar@tiscali.cz

2011-05-21 110 jaroj de Esperanto en Brno

Info: malovec@volny.cz

2011-06-04 Inaŭguro de nova ekspozicio en Esperanto-muzeo Svitavy pri la temo „Esperanto kaj spiritaĵoj tradicioj de la mondo“, enkadre de Muzea Nokto.

Info: dvor.libuse@seznam.cz

2011-06-10/12 Solenaĵo omaĝe al centjariĝo de Esperanto-klubo en Olomouc.

Info: dudajanol@centrum.cz

2011-06-19 Tradicia renkontiĝo (jam 75 jarojn!) de ĉeĥaj, polaj kaj slovakaj esperantistoj sur la pinto de la monto Ĉantorio sur la ĉeĥa-pola landlimo.

Info: suchanekj@seznam.cz

2011-07-03-/16, 07-17/30, 07-31/08/13 Tri etapoj de la 59-a Somera Esperanto-Tendaro en Lančov apud Vranov-lago.

Info: podhradska@volny.cz

2011-07-14/21 Kongreso de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE) en Olomouc.

Info: priborsky@brailnet.cz

2011-08-02/09 Kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) en Poděbrady.

Info: cea.polnický@quick.cz

2011-08-12/14 Renkontiĝo de iamaj partoprenantoj de Somera Esperanto-Tendaroj en Lančov.

Info: podhradska@volny.cz

2011-09-10 Postferia renkontiĝo en Putim.

Info: pisek@esperanto.cz

2011-09-11/18 EKOTUR 11. Tradicia eko-turisma renkontiĝo por biciklantoj kaj piedturistoj en Dobřichovice (itineroj en Bohemia Karsto kaj montetaro Brdy).

Info: chrdle@kava-pech.cz

2011-10-07/09 Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Šumperk.

Info: www.esperanto.cz, Tomecek@esperanto.cz

2011-10-15 Desegnado kun Pavel Rak en E-muzeo Svitavy. Info: dvor.libuse@seznam.cz

2011-10-26/30 Wikimania de vikipediistoj en Svitavy

Info: evikimania@gmail.com


2011-12-10 Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek.

Info: pisek@esperanto.cz

Josef Cink

29.6.1933-11.2.2011

Post longa malsano forpasis vendrede la 11-an de februaro 2011 en aĝo de 78 jaroj Josef Cink, mezlerneja instruisto, eminenta tradukanto kaj aŭtoro de lernolibroj kaj kantaroj.



Jam kiel studento en Brno li aktive partoprenis teatran agadon de junularo aktorante dum klubaj vesperoj. Lia unua memstara eldonaĵo estis *Junulara kantareto* (1960), poste sekvis ankoraŭ du (1968, 1980). Nia publiko lin konas kiel aŭtoron de *Cvičebnice esperanta pro pokročilé* (Ekzercaro por progresintoj, 1974) kun blua stelo kiel daŭrigo de simila lernolibro de Kilian por komencantoj kun verda stelo. Ĝis nun la asocio uzas lian korespondan kurson *Pisemný kurs mezinárodního jazyka esperanto* (1980, 1988, 1999). Li esperantigis minimume kvardek kantojn (la plej populara estas *Alaŭdeto*), estis preparanta novan frazeologion kaj aktivis ankaŭ en la ekzamena komisiono de ĈEA. Kiel IKUE-ano li instruis ankaŭ en Herbortice.

-mm-

Jak platit svazu

V kterékoliv pobočce Poštovní spořitelny a ve většině poboček České pošty si vyžádáte **tiskopis VKLAD**, který vyplníte ve všech kolonkách: **částka Kč** - sumu, kterou platíte, **č. účtu**: 195 230 825/0300, **variabilní symbol**: má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Další pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete L. Hýblové seznam, za koho platíte. **Konstantní symbol** je 0379 a **název účtu** je: Český esperantský svaz. Stejná čísla uveďte na ústřížek, který slouží jako doklad o platbě. Platba je bez poplatku.

Seznam čísel (variabilní symboly):

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06945** kongres EEU
- 50200** sekce železničářů IFEF
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 86-7290070227/0100
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio

Upozornění

pro sekce, kluby a kroužky ČES

Občanská sdružení jsou podle vyhl. 634/2004 Sb. osvobozena od placení poplatků za ověření listiny - t.j. položka 4 - a za ověření podpisu - t.j. položka 5.

Zájemci o časopisy

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz. Předplatné uhradíte na účet u Poštovní spořitelny v Poděbradech, č. ú. 231 798 902/ 0300, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

POZOR: změna PŘEDPLATNÉHO!

Monato: 1020,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 610,-Kč

La Gazeto: 550,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5

La Ondo de Esperanto: 520,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4, reta versio 310,- Kč.

Juna Amiko: 240,- Kč, v.s. 07004, 3 čísla ročně, 50 stran formátu A5

Literatura Foiro: 940,- Kč (*620,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5

Heroldo de Esperanto: 1020,- Kč (*680,- Kč), v.s. 07006, 17 čísel ročně, 4 strany formátu A 3

Femina: 630,- Kč (*420,- Kč), v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A4

Litova Stelo: 260,- Kč, v.s. 07008, 6 čísel ročně, 36 stran formátu A5

*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".

Periodikum Českého esperantského svazu - 42. ročník

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

malovec@volny.cz

<http://members.chello.cz/malovec/>

Předplatné v Česku (bez členství ve svazu): 200 Kč

Členská evidence a změny adres:

**p/a Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789
62 Olšany, libusehyblova@seznam.cz,
tel. 774 928 974**

Uzávěrka příštího čísla: 7.5.2011

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio -
- 42-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj
aŭ rekte ĉe nia Asocio**

Abonprezo: 10 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

Redaktoro: Miroslav Malovec,

Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

Ĉeĥio, malovec@volny.cz

<http://members.chello.cz/malovec/>


Presis: DTP centrum, Svitavy

**Redakto-fermo de la sekva numero:
7.5.2011**

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj:

1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.



Písemné kurzy

Cink – Kurz pro začátečníky (20 lekcí)

400,- Kč při zasílání lekcí elektronickou poštou, 720,- Kč při zasílání klasickou poštou

Marček – Kurz pro začátečníky (20 lekcí)

600,- Kč při zasílání lekcí elektronickou poštou (500,- pro členy ČES), 800,- Kč při zasílání klasickou poštou

Cink- Kurz pro pokročilé (40 lekcí)

600,- Kč při zasílání lekcí elektronickou poštou (500,- Kč pro členy ČES), 1.080,- při zasílání klasickou poštou (980,- Kč pro členy ČES)

Příhlášky a informace:

kurzy@esperanto.cz

**Klasickou poštou: Jana Melichárková,
Polní 938, 696 02 Ratiškovice**